165
PREFECTURE D'ALGER
DEPOT LÉGAL

1re Année — Jeudi 20 Juillet 1905 — N° 10

5 Centimes — 5 Centimoj

LA ALĜERIA STELO

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL — DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie	2 fr. »	Alĝerujo, Tunisujo	2 fr. »
France	2 fr. 50	Francujo	2 fr. 50
Etranger	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, ALGER.
Prix sur demande

DIRECTEUR-FONDATEUR
Barthélemy BALS
ADMINISTRATEUR
Louis LANDES

La Anoncoj estas ricevataj al la Administracio de la Ĵurnalo, 57, rue d'Isly, ALGER.
Prezoj laŭ peto

Notre premier Abonné Protecteur
Nia unua Protektanta Abonanto

Comte ALBERT GALLOIS

IL nous est doux de présenter aujourd'hui, à nos lecteurs, le portrait de notre sympathique ami, le Comte ALBERT GALLOIS, le **premier abonné protecteur** de notre petite « Alĝeria Stelo ».

En publiant ici la photographie de ce dévoué « samideano » nous ne pouvons nous refuser à donner, sur lui, quelques notes biographiques, incomplètes, peut-être, mais suffisant largement pour démontrer que le Comte Gallois est un de ces hommes que l'histoire espérantiste n'omettra pas d'honorer en ses pages d'or, et dont parleront plus tard nos descendants à qui nous aurons fait valoir son mérite parfois grandiose.

Le Comte Albert Gallois est français, mais habite à Riolunato, province de Modena (Italie), parce qu'il a épousé une femme italienne.

Dès l'année 1876, il voyagea sans cesse, visitant tour à tour la Belgique, l'Angleterre, l'Amérique et l'Afrique Occidentale.

En 1902, il créa, à Riolunato, le premier groupe espérantiste, et, en octobre de la même année, il fonda la Société Italienne, dont il fut le secrétaire géné-



COMTE ALBERT GALLOIS

Grafo ALBERT GALLOIS

Gi estas por ni tasko tre agrabla, prezenti hodiaŭ al niaj legantoj la portreton de nia simpatia amiko, Grafo ALBERT GALLOIS, la **unua protektanta abonanto** de nia eta « Alĝeria Stelo ».

Publikante tie ĉi, la fotografaĵon de tiu ĉi sindona samideano, ni devas ankaŭ skribi kelkajn biografiajn liniojn, ne trelongajn, eble, sed sufiĉajn por elmontri, ke Grafo Gallois estas unu el tiuj homoj kies historio esperantista ne forgesos honori en ĝiaj oraj paĝoj, kaj kies parolos en la estonteco, niaj genepoj, al kiuj ni valorigos liajn indojn kelkfoje grandegajn.

Grafo Albert Gallois estas franca, sed loĝadas en Riolunato, provinco de Modena (Italujo), ĉar li edziĝis italan sinjorinon.

De jaro 1876, li senĉese vojaĝis, kaj vizitis intersekve Belgujon, Anglujon, Amerikon kaj Okcidentafrikon.

En jaro 1902, li fondis, en Riolunato, la unuan esperantan grupon, poste, dum oktobro de l' sama jaro, li fondis la Italan Societon, kies li estis la ĝenerala

ral. Il fut aussi rédacteur en chef de l' « Esperantista », organe italien de la susdite société.

Le Comte Albert Gallois est membre de la S. F. P. E., de la British Esperanta Association, du Groupe Esperantiste d'Alger et de l'Afrique du Nord, et de bien d'autres encore.

En janvier 1905, il vint à Alger, où les espérantistes de la localité le reçurent cordialement, puis il alla à Sétif et y fonda une section du Groupe d'Alger.

En ce même mois, il dut, et cela au grand regret de tous les espérantistes italiens, abandonner complètement ses fonctions de secrétaire général de la société et de rédacteur en chef du journal précité, à cause de ses autres occupations par trop nombreuses.

Malgré cela, il n'en reste pas moins un fervent défenseur de notre sainte cause qu'il fait sans cesse progresser autant par ses actions que par les excellents articles qu'il publie dans divers journaux. Nous nous sommes fait un plaisir d'apprécier avec quelle savante critique il met les choses au point.

En terminant ces trop courtes notes biographiques, nous faisons appel à tous les espérantistes et les prions de se joindre à nous pour rendre un fraternel hommage au dévoué « samideano », le Comte Albert Gallois.

BARTHÉLEMY BALS.

sekretario, li estis ankaŭ ĉefredaktoro de l' « Esperantista », itala organo de la nomita societo.

Grafo Albert Gallois, estas membro de la S. F. P. E., de la British Esperanta Association, de la Esperanta Grupo de Alĝero kaj de la Nordafriko, kaj de aliaj ankoraŭ.

En januaro 1905, li venis ĉe Alĝero, kie la esperantistaj frate ricevis lin, poste li iris ĉe Setifo kaj tie fondis sekcion de l' Alĝera Grupo.

Dum la sama monato, li tute lasis la oficojn de ĝenerala sekretario de l' Itala Societo kaj ĉefredaktoro de l' ĵurnalo, pro siaj multaj aliaj okupadoj.

Malgraŭ tio, li ĉiam restadas fervoran kunbatalanton de nia sankta kaŭzo kiun li senĉese igas progresi tiom per siaj agadoj, kiom per bonegaj artikoloj, kiujn li publikigas en diversaj ĵurnaloj. Ni plezurege vidis lian lertecon rajtigi la aferojn.

Finante tiujn tro mallongajn biografiajn notojn, ni alvokas ĉiujn esperantistojn, kaj ni ilin petas frate honori la sindonan samideanon, Grafo Albert Gallois.

(Esperantigis LUDOVIKO LANDES).

LA ĈEVALO DE KOSCIUSKO

Kosciusko, la nobla Polo, iam volante donaci botelon da bona vino al Pastron de Soleure, decidis ĝin sendi per junulo nomata Zeltner, al kiu li pruntis sian ĉevalon por la vojaĝo.

Kiam la junulo revenis li aldiris : « Ho ! mia Generala Moŝto, neniam plu mi rajdos vian ĉevalon, nur se, samtempe, vi pruntos al mi vian monujon.

— Kion vi volas diri ? demandis Kosciusko.

— Kiam sur la vojo, respondis Zeltner, mi renkontis malriĉulon kaj li demetis sian ĉapon por peti almozon, tuj haltis la ĉevalon kaj plu ne movis ĝis la almozulo ion ricevis. Tiel baldaŭ mi elspezis mian tutan monon ; kaj tiam mi estis devigata ŝajnigi ion doni por ke la ĉevalo decidiĝu reekiri. »

Tradukis Fraŭlino E. J. CATT.
(Rye-Sussex, Anglujo).

Pri la Vorto « Alĝero »

« Lingvo Internacia » donis kelkajn klarigojn pri la ortografio de la vorto Alĝero, kaj, laŭ ĝia opinio, oni devus skribi kaj elparoli Algero anstataŭ Alĝero.

Ĝi diris ankaŭ, ke, pro malfacileco de la supersignitaj literoj, oni devus jene ortografii la vorton : **Algero.**

Sed, niavice, ni diros, ke la vorto Alĝero devas esti skribata kaj elparolata kun Ĝ, tial ke France, oni elparolas Alĵer ; angle, Alĝiers ; itale, Alĝeri ; hispane, Arĥel, sed ĉe multaj hispanaj provincoj oni elparolas Arĝel ; kaj, fine, la Araboj elparolas kaj skribas El Ĝezair.

Ni do pensas, ke tio estus eraron skribi aŭ elparoli la vorton Algero anstataŭ Alĝero, kaj ni daŭrigos la ortografion de l' nomo de nia urbo, skribante kaj elparolante **ALĜERO**

TIMGAD

SEKVO

Escepte kelkaj riĉegaj personaĵoj, kiuj povis kunigi hejme ĉion la lukson kaj la bonestado de ilia epoko, la urbanoj restadis mallonge hejme ; ilia vivado pasiĝis sur la Forum, en la varmbanejoj, kie ili trovis, krom la zorgoj de delikatega higieno, ludojn kaj foje batalojn. Oni povas supozi, ke en neĉefaj « municipoj » kiel estis Timgad, la teatro donis nur iom maloftajn prezentadojn.

La kondiĉoj de la publika vivado klarigas, kiel la Romanoj disponis siajn domojn laŭ la celo trovi, rehejmiĝintaj, samtempe kiam la plej grandan izolecon, la kvieton de la vivado « intima ». Se la « ruinoj » de Timgad ne permesas rekoni laŭ staraĵo la konstruaĵojn de antikva domo, ili liveras plane la desegnaĵon plenan de la internaj disponoj.

Oni, vidas ke vizitanto eniris per larĝa pordo, ke nenia malfermaĵo ekzistis en la eksteraj muroj, kaj ke la diversaj partoj de la loĝejo lumiĝis per internaj kortoj aŭ atrium'oj,

Kelkfoje la bienulo rezervis, por si kaj sia familio, per kaŝita pordo, boritan al strateto, ĉe la ekstremaĵo de la domo. Tiu elirejo ebligis eviti la « ĝenantojn », klientojn aŭ petantojn « ne liskretajn », haltigitajn en la atriumo aŭ sub li peristilo.

La vojaro rilatis kun la dispono de la konstruaĵoj ; la stratoj, limitigaj de muroj aŭ humigantaj nur al butikoj, estis mallarĝaj, lia « eksklusiva » celo ŝajnis esti, krom la ĉefaj vojoj, ebligi la laŭirado de la piedirantoj.

Estus malfacila imagi ĝuste la lukson de la loĝejoj en Timgad ; solaj, pecetoj de marmoraj surmetaĵoj troviĝas ankoraŭ sur kelkaj murflankoj. Oni « malalgluis » du grandajn mozaikojn malfeliĉe neplenajn, la ĉefan precipe, prezentantan hermafroditon.

(Daŭrigota). Traduko de Esperantisto.

(Pro la foriro de S-ro Capé, kiu pruntis al ni la klišaĵojn de la antikva urbo Timgad, ni ne povas daŭrigi la publikadon de tiuj ilustraĵoj). — R.

Niaj Vizitaŋtoj.

Dum la lasta monato, ni ricevis la sekvantajn ĵurnalojn aŭ revuojn :

LINGVO INTERNACIA (duonmonata), 33, rue Lacépède, Paris (Francujo).
BELGA SONORILO, S-ro Vandersleyen, 31, rue des Patriotes, Bruxelles (Belgujo).
SVISA ESPERO, S-ro Th. Renard, 6, Vieux-Collège, Genève (Svisujo).
MEKSIKA LUMTURO, S-ro D-ro Vargas, S-ta Rosa Necoxtla, (Meksiko).
BRITISH ESPERANTIST, S-ro H. Clegg, 14, Norfolk-Street, Strand, London.
ESPERO KATOLIKA, S-ro Em. Pelletier, Cheillé (Indre-et-Loire), Francujo.
RUSLANDA ESPERANTISTO, S-ro Asnes, Peterburgo (Rusujo).
ESPERANTO, S-ro Paul Berthelot, Céret (Pyrénées-Orientales), Francujo.
GEFRATARO ESPERANTA, S-ro Rafaelo Bagnulo, Largo Gesù e Maria, n· 4, Napolo (Italujo).
THE ESPERANTIST, S-ro Bolinbroke Mudie Esq., 67, Kensington Gardens Square, London (Anglujo).

Amuzaĵoj

OKA PROBLEMO

Kvin birdetoj staras kantante sur arbo, alvenas ĉasisto, kiu, pafe, mortigas tri da ili.

Kiom da birdoj restas ?

La solvo en nia proksima numero.

Solvoj de nia lasta numero problemoj :

KVINA PROBLEMO :

Ĝ I
B O
Ĝ I B O

SESA PROBLEMO : L I R O
L I P O
L I M O
L I G O
L I T O
L I N O

SEPA PROBLEMO : B A T A L Ó
A C I D A
T I M O
A D O
L A
O

VIZITO ĈE TUNISO EN 1888

En jaro 1888, kiam mi vizitis Tunisujo, Tuniso tre malmulte similis Tunison de 1905.

En tiu ĉi epoko, jam ne estis la bela kanalo kiu nun de l' maro alkondukas Tunison, kie la vojaĝantoj elŝipigas sur la belega aleo DE LA MARINE ; tiam, por elŝipiĝi, oni devis uzi malgrandan barkon, kiu kondukis vin ĝis La Goulette (esperante : La Guleto), poste oni alvenis Tunison per itala fervojo.

Tiam, la urbo jam ne enhavis belegajn eŭropanajn konstruejoj, kiuj nun faras Tunison, unu el la plej belaj urboj de nia Nordafrika Kolonio. Bulvardo (aŭ aleo) DE LA MARINE, kvankam ĝi estis konstruita, tamen ne jam enhavis multajn domojn, sed nur la palacon de Franca resladejo, kaj la katolikan katedran preĝejon. Proksime la PORDO DE FRANCUJO, la poŝtoficejo esti malbela lokejo, tute malsimila je la nuna luksega poŝthotelo. Sed, kiel kurioza kaj interesa estis, en tiu ĉi epoko, la araburbo, kun ĝiaj mallarĝaj stratoj, kie nur loĝis Arabojn kaj Hebreojn, kiuj havis vestojn tiel riĉajn kaj belajn ! precipe la Hebreinoj, kun siaj kapornamoj, finitaj per ora konuso, siaj vestoj je helaj koloroj kaj siaj multaj juveloj multekostaj.

La SOUKS, kovritaj bazaroj (esperante : la SUKOJ), estis precipe tre interesaj kaj kuriozaj : ili prezentis longan sekvon de kovritaj koridoroj, ne tre larĝaj, ĉe ambaŭ flankoj kuŝis multaj tre malgrandaj butikoj, kiuj enhavis riĉecojn vastegajn kaj multspecajn : enlandajn ŝtofojn, kiuj havis delikatecon kaj belecon reale neordinarajn ; armilojn riĉe ornamitajn per strangaj oraj kaj arĝentaj arabeskoj ; ledajn jungaĵojn, artiste kudritaj per oraj kaj arĝentaj fadenoj, arabmaniere ; multajn juvelojn kaj aliajn aferojn, kurioze laboritajn kaj delikate ĉizitajn ; fine, multajn enlandajn kamercaĵojn, ĉiujn belegajn kaj strangajn.

Pro tio, kiam oni eliris la sukojn, post longa vizito, oni reale pensis reveni de malproksima lando, kaj eliri de ensorĉa songo.

En Tuniso, ankaŭ tre belaj estas la moskeoj, kun ĝiaj minaretoj (preĝejaj turoj), tute skulptitaj kaj ĝiaj multkoloraj fasadoj ; fine, la vivmovado mem ĉe Araburbo lasis ĉarman impreson, kiu havigis grandegan plezuron.

La Tunisaj ĉirkaŭaĵoj ankaŭ estas tre interesaj ; unue, estas LA BARDO, antikva restadejo de la « Beys » de Tuniso, kie estis subskribita la traktaĵo inter Francujo kaj Tunisujo, post la militado. Tiu ĉi palaco enhavas ĉambrojn, kiuj estas veraj Tunisaj arĥitekturaj mirindaĵoj ; unu el tiuj, precipe, min impresis ; ĝiaj muroj ŝajnis grandegan punton, mirinde loboritan ; poste estas la fama ĉambro de l' trono, kiu estas longa 50 metrojn ĉirkaŭ, kaj enhavas dudekon da horloĝoj.

Al BARDO, la « Bey » venis ĉeesti ĉe la ekzekutioj de siaj subuloj, kiuj, mortkondamnitaj, devos morti pendotaj.

Ankoraŭ mi citos LA MARSA, nunan restadejon de l' « Bey » ; KARTAĜON, ĉe kiu bela preĝejo altigiĝas sur la loko, kie kuŝis iam antikvan Kartaĝon, proksime, troviĝas la tombo de Sankta Ludoviko ; poste, LA GULETON, kun malliberejo por Araboj ; fine, HAMMAMLIF, malgrandan vilaĝon, kiu estas loko por marbanoj.

Resume, Tuniso en jaro 1888 estis reale interesa kaj kurioza ; Tuniso en jaro 1905, estas tute moderna, komforta kaj admireginda, sed, vere, mi tute pliamis antikvan Tunison, car, ĝi tiam montris lokan koloron, kiu, laŭ mia opinio, estas la sola ĉarmo por malproksimaj alilandoj.

GRAFO ALBERT GALLOIS,
Membro de la Grupo de Alĝero kaj de la Nordafriko.

GRAFO GALLOIS, en Riolunato (provinco de Modena) ITALUJO, deziras ricevi malnovajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Li sendos, interŝange, ĉiujn italajn poŝtmarkojn malnovajn kaj nunajn.

RECHERCHES dans tous les pays de généalogies, documents historiques et biographiques, titres nobiliaires, armoiries. ordres de chevalerie, distinctions, etc. *Informations*, **C. MULKAY**, 16, rue des Minimes, *Bruxelles* (Belgique). Reçoit sans frais commons, annonces, abonnements à *La Alĝeria Stelo*.

L'INSIGNE d'Emile GASSE espérantiste Etoile Verte **INTERNATIONAL** est en vente dans nos bureaux, 57, rue d'Isly, Alger, au prix de **1** franc ; par poste recommandé, **1** fr. **15.**

Tous les Espérantistes doivent avoir l'**Etoile Verte.**

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accentuées de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris

Michel Lledo

Tirage 5500